Año XIII N.° 4 (128) JULIO-AGOSTO 1961

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA



Valladolid.—Plaza de Zorrilla y Academia de Caballería

Valladolid, la bela kaj alloga kastila urbo gastigos la venontan Kongreson de Esperanto. La amasa partopreno de la hispana samideanaro estos la pruvo de nia pravo

BOLETIN
DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Redaktoro: S-ro Angel Pérez Saura
Str. V. Sancho-Tello, 24, b. d.
VALENCIA (Hispanujo)

Monsendojn adresu nepre al:
S-ro Ernesto Guillem - Str. Marqués de Caro, 6
Valencia (Hispanujo)

Kotizoj de la Federacio por ricevi BOLETIN
Membro abonanto: 60 pesetojn, jare.
Membro subtenanto: 120 pesetojn jare.
Ĉi tiuj membroj ricevas du ekzemplerojn se ili tíon deziras.
Eksterlandaj abonoj: Minimume, 60 pesetojn jare.
Kolektivaj membroj: 6 pesetojn jare.
La grupo ricevas po unu ekzemplero por ĉiu deko de tiuj membroj.

Korespondaj anoncetoj: 10 pesetojn aŭ du respondkuponojn ĉiu 20 vortoj aŭ frakcio.
Pri aliaj anoncoj, bonvolu peti informojn.

47-a Universala Kongreso de Esperanto

4-11 Aŭgusto, Kopenhago

La ĉefa administrado de la kongreso estas prizorgata de la Centra Oficejo de U. E. A., Eendrachtsweg, 7, Rotterdam, Nederlando. Tien oni sendu la aliĝilojn por la kongreso kaj ĉiujn kotizojn.

Petu aliĝilojn al la Centra Oficejo de U. E A. kaj al la landaj delegitoj.

Aranĝoj antaŭ la Kongreso.

Kongresaj laboroj.

Kulturaj kaj artaj programoj.

Festoj.

Internacia Infana Kongreseto.

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

Ekskursoj.

Postkongresaj aranĝoj.

JEN LA SEKRETARIO

Debiendo proceder a la elección de nueva Junta Directiva de la Federación, remitimos a los socios de ésta, junto con el presente número de Boletín, *una papeleta para tomar parte en la votación, de la que habrán de salir los nuevos directivos.*

Los candidatos relacionados, ya dados a conocer en el libro del congreso de Palma de Mallorca, son. en cuanto a los que necesariamente han de residir en Valencia, los mismos que figuraban anteriormente, con la inclusión del Sr. Forné, que sustituye al Sr. Bosch. Esta repetición de las mismas personas, creemos no es aconsejable, pero, por otro lado, no se tiene otro remedio mientras no se muestren propicias otras a relevar a las actuales.

Los candidatos de fuera de Valencia son distintos, a excepción del Sr. Enfedaque, de Madrid.

Todos los socios deben remitir a la Federación su papeleta, debidamente cumplimentada, entendido que cada cual puede sustituir total o parcialmente los nombres propuestos, ya que éstos solamente se proponen a título de orientación. La fecha tope para la admisión de las papeletas es la del 30 de Noviembre próximo.

Debe de tenerse en cuenta que, de acuerdo con el Reglamento, recientemente reformado, la mitad de los candidatos propuestos serán elegidos para un período de cuatro años, mientras que la otra mitad lo será para dos solamente.

Esta modalidad se propuso, y fue aceptada, con el propósito de evitar la total renovación de la directiva cada dos años y también para evitar el anquilosamiento de la misma, puesto que solamente podrá ser reelegido una sola vez cada candidato.

Finalmente, quisiéramos hablar de los grupos adheridos últimamente a la Federación y de los que todavía no lo han hecho; pero, agotado el espacio de que disponemos, lo dejamos para el próximo número

HEF. Secretaría

¡Alas!

Tendencia humana desde hace milenios ha sido la de volar.

Pero esa tendencia no se ha limitado a la conquista física del espacio. Mucho antes de que el hombre lograra elevarse unos centenares de metros por encima de la corteza terrestre, su imaginación había surcado vertiginosamente los espacios siderales, y su deseo había conseguido ampliar su ambiente. Las sucesivas conquistas de exploradores, navegantes y aventureros fueron el resultado de esa tendencia expansiva, y el clan, la tribu y el poblado fueron paulatinamente creciendo, fundiéndose con otros afines, para acabar constituyendo las nacionalidades, con lo que muchos creyeron haber alcanzado la meta de la organización político social. Pero detenerse en la evolución significa algo letal. Apenas constituídas las naciones, surge el deseo—más bien, la necesidad—de proseguir transformando y perfeccionando el montaje social. Hasta las naciones más ranciamente aislacionistas sienten la vital necesidad de transformar su asepsia nacional por una comunidad, no solamente económica, sino política y espiritual. Y aun aquellos que vivan cortos años, tendrán oportunidad de contemplar el espectáculo—por muchos motivos, reconfortante—de la desaparición de los pasaportes, de los aduaneros, del cambio de moneda, y de tantos otros tinglados que, hace apenas un trienio, parecían instituciones inamovibles y básicas.

Las alas del expansionismo y de la fusión, que son vectores de un humanismo biológico y filosófico, siguen una trayectoria coincidente, más que paralela, a la del pensamiento moral y religioso de los pueblos. En la meta imaginaria de todo movimiento ético, convergen, por distintos caminos, todas las ideas que persiguen el bienestar de la humanidad, pero, al llegar a esa coincidencia, se encuentran con un obstáculo, al parecer insignificante, pero, en realidad, totalmente obstruccionista: la incomprensión idiomática.

Su importancia es, al parecer, tan insignificante, que, hasta ahora, los gobiernos no le han concedido beligerancia. En realidad, su potencia es tan efectiva, que puede esterilizar—y hasta ahora, lo ha hecho—los más fervientes y sinceros deseos de fraternidad humana.

Sobre la tierra existe una reducida minoría, la esperantista, para la cual no existe ese obstáculo; lo superó, gracias al idioma internacional, y, como consecuencia, para ella no existe inconveniente para que las alas de la buena voluntad, de la tolerancia y de la fraternidad, a través de las fronteras, eleven al hombre hasta un estrato superior. Por eso, en aras de esa tendencia a la superación, sacrificando todo egoísmo y aportando todo posible apoyo, se debe favorecer y proteger al Esperanto, sobre cuyas alas se eleva toda una posibilidad de progreso y dignificación de las más nobtes condiciones del hombre.

La XLVI^a Universala Kongreso

La lasta internacia—universala estas, ja, ankoraŭ tute neebla afero!—efektiviĝis en Harrogate (Anglujo), de la kvina ĝis la dekdua de pasinta aŭgusto, kaj, ĝia disvolviĝo markis plian mejloŝtonon sur la vojo de la progreso de Esperanto.

Kvankam la ĉeestantaro estis malpli multenombra ol en pasintaj kongresoj, la partopreno estis komplete ĉiukontinenta, kaj la 1.700 kongresanoj suferis pro dubemo ĉu ĉeesti tiun aŭ alian aranĝon. Kiel ĉiam, la medio estis kontentiga, pro la alloga kongresurbo, pro la perfekta programigo kaj, ne malpli, pro la reganta etoso de senkompara kamaradeco.

Ĉiu kongreso havas sian specialan trajton; ĉi lasta estis la kongreso de la Arta Festivalo. Efektive: teatro, muziko, danco kaj kanto havis bonajn kaj brilajn prezentadojn. Pli ol en antaŭaj kongresoj oni atentis la enaltigon de la artoj—eĉ pentrarto havis notindan ekspozicion—kaj ĉiuj povis konstati la ŝaton de esperantistoj por ĉiuj artaj manifestadoj. Prof.° Hideo Yagi, Prezidanto de la japana universitato Okajama, vicprezidanto de U. E. A., malfermis la kongreson. Salutis la reprezentantoj de kelkaj registaroj. Bedaŭrinde, kvankam la hispana demarŝis por saluti la kongreson—kio estas, ja, por ni, grava kontentigo—tiu decido ne efektiviĝis, pro lasthora neeblo de Prof.° Sancho Izquierdo por translokiĝi al Harrogate, kaj malfruigo de nia urĝa depeŝo por atingi ĝustatempe la celon.

Ni esperas ke, venontjare, ni estos pli bonŝancaj!

La festparoladon faris, tre elokvente—kiel ĉiam—Prof.° Dr-o Ivo Lapenna, kiu emfazis pri la bezono de la mondo por havi taŭgan rilatigilon inter Okcidento kaj Oriento, kaj reliefigis la fortan intelektulan movadon por havigi al UEA la Nobel premion por la paco.

Dum la kongreso, la laborkunsidoj estis tre fruktodonaj; ne ĉio estis arto kaj amuzajoj, kaj, pli ol en antaŭaj kongresoj, la infana kongreseto gravis. Ili havis taŭgan kaj allogan neston, kaj ili estis tre trafe prizorgataj, tiel ke, ĉe la fino, ni povas aserti ke ĉiuj bone akordiĝis kaj promesis retroviĝi en postaj kunvenoj.

La plej interesa rezolucio de la kongreso estas la redaktado de la Internacia Interkonsento por ke ŝtatoj starigu la instruadon de Esperanto en la lernejoj. Laŭŝajne, Jugoslavio estas preta akcepti la interkonsenton se tri aliaj landoj akordiĝas. La momento, do, estas tre favora al la akcepto oficiala de Esperanto.

U. E. A. ĵus aĉetis novan ejon, en Rotterdam, laŭ komuniko al la kongresanaro.

Kopenhago gastigos, pliafoge, la internacian kongreson, venontjare. Antaŭkongrese, en Londono, okazis tre grava seminario pri kuraĝigo de rilatoj inter Oriento kaj Okcidento. Partoprenis, inter aliaj: Prof-ro Hideo Yagi; Prof-ro Neergaard; Prof-ro Pragano; angla fakulo pri orientaj lingvoj, A. C. Barnes kaj Prof-ro Ivo Lapenna. Ĉiuj intervenoj estis tre interesaj, kaj, oni decidis pliintensigi la eldonadon de libroj kaj sonbendoj por ke la kulturaj rilatoj inter Oriento kaj Okcidento estu pli facilaj kaj, cele, pacigaj!

La prezidanteco de U. E. A. vakas, ĝis kiam, en Kopenhago, estos elektata la nova Prezidanto, venontjare.

Fine, la Kongresa Flago estis transdonata al sam-o Neergaard, kiu invitis ĉiujn al la 47.^a en Kopenhago.

Resume: la kongreso sukcesis, la kongresanoj kontentiĝis, kaj, pliafoje, la taŭgeco de Esperanto por diversspecaj internaciaj rilatoj, pruviĝis.

(Plejparte, laŭ raporto de nia braztla sam-o Fr-o de Souza Almada).

LENGUAJE UNIVERSAL

Editorial de la importante revista «ECCLESIA», n.º 1.053 del 16-9-61, que por creerlo de gran interés para nuestros lectores hemos reproducido íntegramente.

En Harrogate—Gran Bretaña—se ha celebrado recientemente un Congreso mundial de Esperanto. Es un hecho importante que no debe infravalorarse. La Conferencia de Harrogate hace el número 46 de las de su clase. Han asistido 1.700 delegados de los principales países del mundo. La UNESCO ha tenido sus propios observadores. En fin, la empresa—difícil entre las difíciles—no deja de despertar honda simpatía, aun al margen de toda consideración meramente utilitaria.

Por lo demás, destacados grupos de católicos han formado la Unión Internacional Católica de Esperantistas, que en su revista *Espero Katolika* («Esperanza Católica») tienen un bello ideal al que servir y un buen instrumento de trabajo.

La confusión de lenguas, desde los bíblicos tiempos de la torre de Babel, ha sido signo de división entre las gentes y de lamentable falta de entendimiento. Podemos pensar, por el contrario, que, a través de la comunidad de expresión, podrían los hombres entenderse más cordialmente. Y cuán necesario sea reforzar todos los elementos de contacto entre pueblos y razas, naciones y continentes, grupos sociales y económicos, nos lo dice la actual situación del mundo, mucho más grave que en cualquier otra época de la historia. No todos son factores negativos. Pero el tono general de las informaciones periódicas autoriza a pensar que el egoísmo, la desconfianza, la lucha de clases y el odio de razas, encabezan la lista de enemigos que los hombres de buena voluntad deben combatir sin descanso.

Sin admitir fáciles utopismos, pensamos que el esperanto puede ser un elemento más entre los instrumentos de este fecundo trabajo. No sustituirá a las lenguas maternas. Quizá no llegue siquiera a ser una lengua popular. Pero puede dar una expresión común a los hombres cultos, puede servir de comunicación entre los grupos selectos de esa multitud de pueblos que han despertado en Africa y Asia con enormes recelos para todo coloniaje y con un problema tribal de variadísimos matices en las estructuras sociales y políticas, en el régimen de las familias y en la expresión idiomática.

Existen ciertamente las lenguas cultas, que tienen amplísima zona de influencia. Nuestra lengua española ocupa un lugar destacado entre ellas. No han faltado quienes pensaran en el latín como lengua clásica, cuya utilidad universal está bien probada por la ciencia y por la Iglesia Católica.

Pero la simplicidad básica del esperanto luchará con ventaja sobre todas estas hipótesis. Y el altisimo porcentaje de raíces greco-latinas que han entrado en su vocabulario lo hacen especialmente accesible a cuantos hablan las lenguas más difundidas internacionalmente.

De todas suertes, a nosotros los católicos la idea tiene forzosamente que seducirnos. Porque somos naturalmente universalistas y tenemos un mensaje evangélico para todos los hombres, y una misma redención para todos los pueblos, y una oración fundamental que rezar ante el Padre, que está en los cielos. Todo lo que ayude a que las gentes se acerquen más merece nuestra alabanza. Y cuando hablamos del esperanto instintivamente pensamos en ello.

El próximo Congreso Nacional de Esperanto se celebrará en Valladolid

¡Valladolid invita a todos!

Por primera vez, Valladolid va a recibir a esperantistas de toda España y a cuantos extranjeros quieran visitarla, para celebrar un Congreso de la lengua internacional, el XXIII de la Federación Española de Esperanto, que ha de celebrarse el mes de Julio del próximo año 1962.

Valladolid, ciudad antigua, llena de historia y guardadora de multitud de monumentos y obras maestras del arte del pasado, ha de ser, a no dudarlo, un marco adecuado para este acontecimiento, porque, además, en esta capital castellana se respira un gran ambiente cultural, fiel reflejo del prestigio de su preclara Universidad.

Así, Valladolid, situada en el corazón de Castilla la Vieja, a orillas del río Pisuerga, cuya historia comienza con el mandato del conde D. Pedro Ansúrez, magnate de la corte de Alfonso VI de León, posee buen acopio de vestigios de los tiempos de su esplendor que ofrecer a cuantos la visitan, y los esperantistas que acudan al XXIII Congreso Español de Esperanto podrán gozar de las emociones estéticas más hondas con la contemplación de tantos monumentos y otras obras de arte. He aquí algunos:

La Catedral, monumental obra comenzada por Juan de Herrera, arquitecto de El Escorial, y continuada por el gran Churriguera; el Colegio de San Gregorio, hoy Museo Nacional de Escultura, al que se penetra a través de una fachada de frondosa ornamentación de estilo gótico avanzado, para contemplar en su interior las mejores y más representativas obras de la escultura policromada de Castilla, por lo que este Museo es famoso en todo el mundo; el Colegio de Santa Cruz, fundado por el Cardenal Mendoza, edificio de estilo plateresco, que encierra una biblioteca de obras antiguas, entre las que figuran numerosos códices e incunables, con un total de unos 20.000 volúmenes; el monasterio de San Pablo y su iglesia, cuya fachada es una manifestación esplendorosa de ornamentación gótica y renacentista; la Universidad, que, reconstruída totalmente después del incendio que la destruyó en 1938, conserva su fachada churrigueresca, de armoniosas líneas.

Valladolid conserva aún numerosas mansiones señoriales, que ofrecen un doble interés, histórico y artístico, entre las que destacan el palacio de los Vivero, en donde se desposaron los Reyes Católicos; la casa de las Aldabas, donde nació Enrique IV; la de los Pimenteles, en la que vino al mundo el rey Felipe II, hoy sede de la Diputación Provincial, y la casa que habitó Cervantes, en la que existe un Museo evocador de la memoria del autor del «Quijote».

Podrán también visitar iglesias antiguas, en las que el arte escultórico de los siglos XV, XVI y XVII han dejado multitud de obras representativas, entre las que pueden verse las que forman parte de los «pasos» de los desfiles procesionales de Semana Santa, tan conocidas ya de millares de extranjeros.

Y como en nuestro Congreso no faltarán excursiones, los esperantistas podrán recorrer alguna ruta histórica para conocer el castillo de Simancas, el que, convertido en Archivo nacional, encierra en sus salones documentos importantísimos de nuestra Historia; Tordesillas, dondé pueden verse los restos del palacio que habitó doña Juana la Loca y el monasterio de Santa Clara,



Santa María de la Antigua

bello ejemplar del arte mudéjar; Medina del Campo, con su castillo de la Mota; Medina de Rioseco, famosa por sus iglesias monumentales y su tesoro artístico; Olmedo, Peñafiel, La Espina, Villagarcía, donde pasó su infancia Don Juan de Austria, y tantos lugares más, dignos de la admiración de los turistas.

Pero Valladolid no es sólo una ciudad plena de recuerdos históricos y artísticos, sino que al mismo tiempo es una capital moderna, con bellas y amplias plazas y calles, con bien cuidados parques y jardines y suntuosos edificios oficiales; hermosos paseos y lugares de esparcimiento, entre ellos el río Pisuerga, poblado de barcas de recreo, su playa artificial y sus orillas y sus puentes, que hacen este lugar sumamente atractivo y agradable. Valladolid ha ensanchado también extraordinariamente su radio con amplias barriadas y ha renovado totalmente su servicio de autobuses, gozando hoy de amplios y modernos vehículos.

Las actividades de Valladolid, que eran en otros tiempos casi exclusivamente mercantiles y agrícolas, se han incrementado con la creación de importantes industrias, entre las qne destaca la fabricación de automóviles, camionetas, aluminio, abonos minerales, tableros de fibra, etc. Posee además buenas comunicaciones ferroviarias y por hallarse casi en el centro de España se hace fácil su acceso desde cualquier punto de la periferia.

Por todo esto, nos atrevemos a invitar a todos los esperantistas españoles y extranjeros para que concurran a este próximo Congreso en Julio del próximo año, prometiéndoles una muy feliz estancia en la antigua capital de España, que se apresta a recibir por primera vez a todos con los brazos abiertos. Los esperantistas de Valladolid, que tienen organizado un Grupo numeroso que funciona con regularidad y entusiasmo, ya están trabajando para organizar actos con miras al mejor provecho de la propagación del ideal esperantista y fortalecimiento de nuestras organizaciones, y, al mismo tiempo, otros para proporcionar a los esperantistas que les visiten unos días felices en esta hidalga tierra.


En el próximo número publicaremos un avance del programa y enviaremos seguidamente las hojas de inscripción para que todos puedan devolverlas con la mayor antelación posible.

¡A preparar las vacaciones y el viaje!

¡Valladolid os espera a todos!

NOTA IMPORTANTE. — Están próximas a aparecer unas bonitas tarjetas postales del Congreso, a varias tintas, y sellos, que se proporcionarán en hojas de a 10. Como el pasado año, el precio de las postales será de 1'50 ptas. cada una, y los sellos a 1'50 ptas. cada hoja de 10 sellos.

Se ruega a cuantos deseen adquirirlos hagan sus pedidos lo más pronto posible, con el fin de ajustar la tirada a las necesidades y para que puedan comenzar a circular en la correspondencia en brevísimo plazo.



Villiam Shakespeare. - OTELO, LA MAŬRO DE VENECIO. - Elangligo, enkonduko, kaj notoj de Reto Rossetti. Antaŭparolo de Rov Walker. Eldono de Stafeto (Beletraj Kajeroj). Eldonisto: J. Régulo, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj. 1960. Prezo: 1'80 dol. aŭ egalvaloro. 208 paĝoj.

Ni ne pludiru pri la originalo nek pri la aŭtoro. La tragedio de Otelo, de ĉiuj konata, prezentas, eble pli ol aliaj de la fama angla aŭtoro, kompletan kirlaĵon de ĉiuj virtoj kaj malvirtoj de homoj en socia medio.

La traduko, de Reto Rossetti, prezentas fidelan transskribon de la originalo, kaj, pro tio, ĝi ne ligiĝis al la servo de la devigata poezia regulo. Tamen, plejparte ĝi gardas la mezuron de la ŝekspirajn versojn, kaj ni povas aserti ke lia prozodio estas, vere, poezia.

Rossetti, per tiu tradukverko, faris bonan servon al la esperanta literaturo.

Tre malmultaj neologismoj troviĝas en tiu traduko, plejparte el ili tre kompreneblaj sen helpo de tabulo, kiu, tamen, ĉe la fino de la libro, solvas la eblajn dubojn.

Kvankam plurfoje legata, la tragedio estas tre plezure relegata tra la trafa kaj plensukcesa traduko de Rossetti.

CIRANO

Edwin de Kock. - OMBROJ DE LA KVARA DIMENSIO. - Antaŭparolo de Marjorie Boulton. Stafeto: Beletraj kajeroj, n.° 7. J. Régulo, eldonisto. La Laguna (Tenerife, 1961. 160 paĝoj Prezo: 1'50 usonaj dolaroj.

Per ĉi tiu kajero, la aŭtoro liveras al ni kolekteton de versoj, eĉ poemetojn, pri kies kvalitoj mi kuraĝas etikedi: «Eksterordinaraj!». De Kock estas pli poezianta filozofo ol filozofanta poeto; liaj pensoj estas pli fortaj ol liaj versoj, kvankam ĉi lastaj estas majstre forĝitaj.

Kvankam li avertas la leganton pri la morneco de siaj temoj kaj pri la amareco de siaj versoj, la belo ŝprucas, eĉ kiam li pritraktas profundajn aŭ amarajn aferojn.

Ne mankas delikataj kantoj al la belo kaj la bono, kaj, ĉar li estas fervora esperantisto, ne mankas, ankaŭ, alvokoj al niaj plej karaj emoj. Jen «APELACIO»:

Homoj, en komuna sort' gefratoj,
vi teneraj estu unu al alia;
estu mildaj, kiel flor' al floro,
ĉar ni estas ĉiuj hore ventblovatoj,
sub la dura hajlo agoniaj
kaj forfalas kiel la vesperkoloro.

Ĉu la Ĝardenisto vin ĉagrenas,
misplantinte en la sama monda bedo
homojn kun diversaj haŭtofarboj?

Bestokorpe jen la bunta bel' promenas,
flugas, naĝas, sur tiu ĉi planedo,
elflamas multkolore sur pacamaj arboj.

Estu mildaj, kiel flor' al floro,
kaj teneraj; ankaŭ velkos via horo!

Resume; pri lingvo: korekteco; pri vortfarado: jonglo trafa; neologismoj: malmultaj kaj kutimaj ĉe poetoj; postverke tabuligitaj.

«Ombroj de la kvara dimensio» estas rekomendinda al maturaj esperantistoj; evoluantoj komprenus malmulte de ĝi.

Ĉe la fino de la kolekto, la aŭtoro defendas sian vidpunkton pri versfarado. «Se nur oni forĵetus la pedante skandemajn kaj ofte tute erarigajn krajonojn, kaj aŭskultus per amanta interna orelo, la ritmon la nenecesaj [illegible]moj pri ioma nereguleco malaperus! La naturo malamas la absolutan simetrion.»

ROHO

HISPANA KRONIKO

Lérida

Estas interese komuniki al niaj legantoj iomete pri nia movado. Nia kara kaj aktiva samideano, José Olivé, atingis bonan sukceson en Lerida, kreante en la popola societo «Huracanes» esperantan fakon. Vere la propagando jam komenciĝis, post la apero en leridana ĵurnalo de grava intervjuo kun nia samideano, kiu lerte skizis pri la laboro en venontajn monatojn. Ni devas apogi kaj helpi senrezerve tiun novan esperantan hejmon.

TARRAGÓ

Santander

En letero de la prezidanto de la Esperanto-Grupo el tiu urbo, S-ro Pedro Martínez, ni legas sciigon pri revivigo de la grupo. Kunvenoj, vizitoj de eksterlandanoj, k. t. p.

Valencia

Sur la bulteno de la Valencia Grupo aperas anonco pri la venonta inaŭguro de Esperanto - Kurso en la Universitato, kiel dum pasintaj jaroj. Sur la paĝoj de tiu bulteno, okpaĝa kaj presita sur bona papero, oni povas legi interesajn artikolojn kaj notojn pri la aktiveco de la grupo.

Sabadell

Pasintan 1.an de Oktobro, la urba E-klubo aranĝis Tuttagan Esperantistan Feston, kiu konsistis el: Prelego de akademiano Delfí Dalmau en la aŭditorio de «Caja de Ahorros de Sabadell» kun ĉeesto de urbkonsilantoj Sroj. Gorgori kaj Peig. Ĉi lasta en bela kaj konciza antaŭparolo montris sian simpation por Esperanto kaj ankaŭ al la kulturaj entreprenoj de la Sabadell-a esperantistaro, kiuj, li diris, honoras la urbon; sardano-koncerto dum kiu rondoj de gesamideanoj kaj simpatiantoj dancis laŭ muziksonoj de nova sardano, «Sabadell Esperantista», bela inspiraĵo, speciale verkita de la loka muzikprofesoro Josep M.ª Llorens; posttagmeze, en bela bankedsalono, kunmanĝis 66 gesamideanoj. Ĉe la kafotrinko, la ĉeestantoj nombris pli ol cento. Ĉiuj ĝuis majstran pianludon de la sardano «Sabadell Esperantista» de la aŭtoro mem. La adaptitan tekston propravoĉe konigis laŭreata poeto, malnova esperantisto loka, Ramón Moix. Memore de la ĵus forpasinta katalunа poeziverkisto Sagarra, kluba estrarano Resom belstile deklamis poezion lian. Tuj poste komenciĝis la anoncita Forumo en Esperanto, kiun apertis, en dokumentita parolado, la UEA-ĉefdelegito Ramón Molera kaj, laŭvice, ĝin animis L. Mimó, V. H. Llusera, Sendero, P. Casanovas, Mariano Solá, A. Criach, Vallés kaj D. Dalmau. Prezentis la oratorojn la vigla sekretario de la loka E-klubo, L. Puig. La Forumon oni transprenis en magnetofonan sonbendon. Manprogramoj kaj afiŝoj anoncantaj la feston kaj la E-kursojn invadis Sabadell-on. La du radiostacioj kaj ĵurnalo urbaj plurfoje informis pri la evento kaj krome intervjuis la aŭtoron de la sardano.

V. H. LL.

KVITANCO


— Eltranĉaĵo el ĵurnalo «El Noticiero» (4-6-61) el Zaragoza, kun artikolo verkita de Prof. Miguel Sancho Izquierdo, sub la titolo «Esperanta Angulo» pri la kandidateco de UEA por la Nobel-pacpremio. Sendis: S-ino Emilia Gaston, el Zaragoza.

— Eltranĉaĵo el ĵurnalo «El Noticiero» (6-6-61) el Zaragoza, kun artikoleto pri la Nobel-pacpremio kaj UEA. Sendis: S-ino Emilia Gaston, el Zaragoza.


— Intervjuo al D-ro Hamvai, menciita en alia numero kaj artikoleto aperinta en ĵurnalo «La Vanguardia» (29-7-61) pri, Frendo, nova idiomo. Sendis: S-ro José Lerroux.

— «El Correo de Andalucía» (24-6-61) el Sevilla, kun artikolo pri Esperanto, iom troigita, sed longa kaj interesa. Foto de D-ro Arranz, prezidanto de Madrida E-Klubo. Sendis: Carlos Martínez Fernández, el Sevilla.

— Granda afiŝo por propagando de la someraj E-kursoj de Madrida E-Klubo.



DIVERSAĴOJ



Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta korektan solvon de enigmo, gajnos poenton. Gajnintoj de 5 poentoj ricevas libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 20-a Decembro.

SOLVO DE LA ENIGMO N.° 7

HORIZONTALE

1, Meblas. Pravas. **2,** Trogo. **3,** Ruleto. Rivalo. **5.** Valoros. **6,** Justa. Tajli. **7,** Giganta. **8,** Nepra. Terni. **9,** Dentigi. **10,** Forno. Vagos. **11,** Skabeno. **13,** Matura. Matura. Motivo. **14,** Kadro. **15,** Aborti. Saboti.

VERTIKALE

1, Murdoj. Fremda. **2,** Utero. **3,** Balais. Rostro. **5,** Vagados. **6,** Stola. Klaki. **7,** Leganta. **8,** Fonto. Bredi. **9,** Rondire. **10,** Porko, Nomos. **11,** Stativo. **13,** Vualoj. Gorilo. **14,** Lando. **15,** Stompi. Spioni.

ENIGMO N.° 8

Krucvorta enigmo de J. Devis

Malsupra figuro

HORIZONTALE

1, Remu per una sola remilo, Gluti fluajon. **2,** Malrapida. **3,** Denove translokigu ion. Tiu, kiu posedas k ordonas. **5,** Scienco studanta la konservadon de la sano. **6,** Dio por la kristanoj. Veg., ordinare kolora k odora. **7,** Kaŭzi nenaturan dormon per la drogo. **8,** Brunruĝa peza metalo. Rondforma loko por akrobataj aŭ aliaj spektakloj. **9,** Iri laŭ kurba fermita linio. **10,** Krei starigi organizon. Fortranĉas harojn tutproksime ĉe la haŭto. **11,** Organika sako en kiu komenciĝas la digestado. **13,** Kurante aŭ alsaltante ataki. Lingvo. **14,** Opozicii. **15,** Organoj de aŭdkapablo. Ĉiu el la jarkvaronoj laŭ temperatura vidkpunto.

VERTIKALE

1, Mizeruloj de ĉiuj malŝatataj. Pentraĵo sur muro. **2,** Substanco el dentego de elefanto. **3,** Kondamnis je infero. Konforme al la leĝoj de la naturo. **5,** Trakti iun kun ĉiuj signoj de granda respekto. **6,** Bleki kiel lupo. Kavoj en io. **7,** Veg., el fam. geraniacoj kun belaj floroj. **8,** Eligi sekan krakran bruon. Nedaŭraj, kapricaj kutimoj. **9,** Esprimanta seksan volupton. **10,** Malgraŭ tio. Diris ion per laŭta akra voĉo. **11,** Ĝenerala nomo de armea estro, ekde vicleŭtenanto. **13,** Alkala blanka metalo kies kombino kun kloro estigas la salon uzatan en manĝoj, Ĉiu el la du ostoj de la vizaĝo inter la vangoj k la orbitoj. **14,** Nekurba. **15,** Moka dirmaniero kiu esprimas la malon de tio kion oni diras. Eleganta ĉambro, ordinare vizitantejo.

Pro spacomanko ni ne povis enmeti en nia antaŭa numero la liston de tiuj kiuj jam atingis kvin poentojn. Ili estas: R. Albero, F. Amorós, F. Aliaga kaj A. Escamilla. Al tiuj ni sendos libropremion.

Donativos para el Boletín

ESPERANTO KLUBO S. A. PAYA (Mislata)

	Pesetas
María	5
Ana María	5
Vicentita	5
Finita	5
Consuelín	5
Enriquito	10
Roberto	10
Jacinto	5
Catalá	5
Terol	5
Blasco	5
Alfredo	5
Modesto	5
Ruíz	5
Segura	5
Sanchis	5
Vicente	5
Vilaplana	5
Leopoldo	5
Juanito	5
Joel	5
Tonet	5
Vicente (elec.)	5
Serisola	5
Félix	5
Aparisi	3
Julio	5
García	5
Forés	5
Carlos	3
Sanjuan	3
Eliseo	3
Pedro (vale)	8
Angelet	3
Gimenez	3
Valenzuela	3
Guerra	3
Suma pesetas	180

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

— Statistiko —

Aktuala stato laŭ ricevitaj raportoj

Landoj	Gelernantoj	Lernejoj	Geinstruistoj
Aŭstralio	5	1	160
Britujo	185	15	743
Bulgarujo	220	32	750
Danlando	65	6	100
Finlando	57	1	
Francujo	506	17	425
Germanujo	177	6	
Hispanujo	31	2	
Italujo	118	2	110
Izraelo	3		
Jugoslavio	700	145	4.226
Koreo		1	
Pollando	448	226	
Svedlando	60	2	15
Svislando	21	3	53
TUTO	2.576	460	6.581

Mankas raportoj el Aŭstrujo, Belgujo, Japanujo, Maroko, Nederlando, Urugvajo,

La hispanaj geinstruistoj estas invitataj aliĝi al I. L. E. I. Turnu vin al Sr-o Oskar Svanteson. Skonegartan, 1. Göteborg Vr (Svedujo).

Tarragona kaj aŭgusto 1961-a.

La Hispana reprezentanto: E. Calvet. Gral. Sanjurjo, 7. Tarragona (Hispanujo).

Radio Roma. - Dissendoj en Esperanto

Novembro 1961-a

Merkredon la 1-an: *Kuriero de Esperanto.*—Vendredon la 3-an: *Italaj komponistoj,* Vicenzo Bellini.—Mardon la 7-an: *Tra la literaturo.*—Merkredon la 8-an: *Kuriero de Esperanto.*—Vendredon la 10-an: *La fama kirurgo,* Raffaele Bastianelli.—Mardon la 14-an: *Novaĵoj al Italujo.*—Merkredon la 15-an: *Kuriero de Esperanto.*—Vendredon la 17-an: *Leterkesto kaj bibliografio.*—Mardon la 21-an: *Italaj kanzonoj en Esperanto.*—Merkredon la 22-an: *Kuriero de Esperanto.* —Vendredon la 24-an: *Grandaj Sanktuloj,* S-ta Katarina el Siena.—Mardon la 28-an: *La Ulisido Marko Polo kaj Uliso de Dante.*—Merkredon la 29-an: *Kuriero de Esperanto.*

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA

Depósito Legal V. 309-1959